
KONGRES- LIBRO

34a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO
Sabadell
6an, 7an kaj 8an de decembro 2008

ESPERANTO*
CAT

Loka Kongresa Komitato

- Llibert Puig
- Pere Bernús
- Núria Coll
- Éric Collignon
- Ramon Llop
- Xavier Murcia
- Marina Ollé

Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental),
Catalunya/Katalunio
Tel. (+34) 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2008: individua abonanta membro, 60 eŭroj; pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 120 eŭroj; individua dumviva membro, 1200 eŭroj; kolektiva membro, 120 eŭroj.

Banko: Caixa d’Estalvis i Pensions de Barcelona agència 461 Sabadell, konto-numero: 2100 0461 90 0200055053
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053
Konto UEA: kea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Llibert Puig i Gandia, vicprezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Ferriol Macip i Bonet; kasisto: Àngels del Pozo Serrano; komitatanoj: Hèctor Alòs i Font, Gemma Armadans, Gerard Escuer, Ramon Perera.

Kontrola Komisiono: Núria Coll, Christian Pinard, Òscar Puig.

Kataluna Esperanto-Junularo

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO.

Ret-adreso: kej@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/kej
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Kotizoj por la jaro 2008: juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d’Enginyers, kontonumero: 3025 0002 47 1433276794
IBAN: ES89 3025 0002 4714 3327 6794
CIF: G-58964461

Estraro: Prezidanto: Jordi Aromí; sekretario: Carles Verdugo; kasisto: Xavi Battle; informado: Guillem Sevilla kaj Pau Climent; esperantaj rilatoj: Joan Català; ne-esperantaj rilatoj: Roger Sanjaume.

ESPERANTO* CAT

* Associació Catalana d’Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

Salonoj

Salono Jaume Viladoms

Jaume Viladoms i Valls (1898-1978) dediĉis sian vivon al instruado de sciencoj kaj humanismaj studoj, ĉefe al la proletaro, kaj tial li estis persekutita de la frankismo.

Ok-jara, li jam parolis esperanton, kaj naŭ-jara li korespondis kun esperantistoj el la tuta mondo. Li gvidis multnombrajn kursojn en Sabadell kaj najbaraj urbejoj, kaj aktivis en la laborista esperantomovado, ĉefe en la antaŭmilita Proleta Unuiĝo de Iberaj Landoj kaj en Sennacia Asocio Tutmonda (SAT). En 1950 li gvidis en Sabadell la unuan esperanto-kurson en Katalunio post la enlanda milito kaj kunfondis Centron de Esperanto Sabadell. Li multe aktivis ankaŭ por la postmilita organizado de Hispana Esperanto-Federacio, kies unua kongreso, en Terrassa, li kunorganizis. Kiam oni planis la 53-an Universala Kongreson en Madrido en 1968, li kontraŭis ĝian okazigon pro la reganta diktaturo. La elekto de la diktatoro, generalo Francisco Franco, kiel alta protektanto de la kongreso kaj la nepermeso al ekzilitoj viziti la landon dum ĝia okazigo, igis lin forlasi Universalan Esperanto-Asocio, kies multjara delegito li estis, kaj membriĝi en SAT.

Li estis marksisma aktivulo kaj havis grandan kapablon memlerni, pro kio li fariĝis altnivela instruisto same pri sciencoj kiel pri humanismaj studoj. Li instruis matematikon, fizikon kaj metalurgion al laboristoj post la labortempo, kaj al kiu ajn deziranta lerni. Tio, ke li instruis en la kataluna esperanton kaj malpermesitajn fakojn, kiel materismon, kondukis lin en malliberejon, kie li plu instruis. En Sabadell, la kvanto de lernantoj plinombrigiĝis

tiom, ke li devis trovi novajn ejojn. Fine li povis krei la lernejon Delta, nuntempe nomatan Escola Jaume Viladoms, kiu ĉi-jare festas sian 50an datrevenon. En tiu okazo, la urbo Sabadell decidis omaĝi sian elstaran filon laŭlonge de la tuta jaro 2008, al kiu iniciato aliĝis la kataluna esperantomovado.

Salono Criach-Galbany

Antoni Criach i Valls (1899-1976) kaj Antònia Galbany i Cusidó (1907-2002) estis geedza paro kiu konatiĝis en esperanto-medio kaj restis la tutan vivon aktivaj esperantistoj. Li gvidis multajn kursojn de esperanto kaj ilia domo estis vera internacia renkontiĝejo. Ŝi en la jaro 1933 partoprenis kurson de la estonino Elinjo Pen en Aplec Esperanto-Grupo. En la jaro 1971 ili forvendis sian domon kaj vastan terenon ĉirkaŭan kaj donacis monon al Centro de Esperanto Sabadell (CES) por aĉeti propran sidejon. Ilian malavarecon ni memoras per plato en nia ĉefa salono. Ni rehonorigas ilin per kongresa salono ilianome.

Salono Eulàlia Giner

Eulàlia Giner i Bono (1916-2007) esperantistiĝis antaŭ la hispana civila milito kune kun sia edzo kaj aliĝis al Centro de Esperanto Sabadell postmilito. Tre aktiva, ŝi gvidis en la 1970aj kaj 1980aj jaroj infanan esperantistan grupon kun averaĝe dudek kvin geknaboj. Meritplenan omaĝon ŝi ricevis en oktobro 2000 pro iniciato de la tiamaj infanoj, jam gejunuloj.



La revo pri komuna lingvo bazita sur la racio kaj la universaleco estas bela homa aspiro. Lingvo ne dependanta de ekonomiaj intereso, sed haviganta al la homoj la rajton je komunikado.

Lingvo internacia, neŭtrala, egalisma, alirebla kaj vivanta estas komuna posedaĵo de la homaro, kiun oni devas impulsi, koni kaj diskonigi. Ĉar lingvo ne povas vivi, se ĝi ne estas parolata kaj kundividata.

Tutmondiĝo havas altan prezon: ĝi povas fajli la diferencojn kaj homogenigi la mondon.

Necesas zorgi pri ĉies komuna heredaĵo, pri la grandaj homaj konkeroj, pri la grandaj ideoj.

Ni ne konfuzu urĝon kun gravo. Ofte por vivi urĝas lerni la anglan, ĉar tion postulas la labora vivo, sed gravas lerni esperanton, ĉar ĝi signifas multe pli: ideon de vivo, formon vidi la mondon kaj komuniki nin.

Esperanto montras, ke la homaj rilatoj estas multe pli ol simplaj profitdonaj transakcioj.

Zamenhof diris, ke la interna ideo de esperanto estas “sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkitimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton”. Jen la interna ideo ankaŭ de pli bona mondo, kiu proksimigas la homojn kaj fratigas ilin.

Komence esperanto nomiĝis Internacia Lingvo, sed ĝi transprenis la nomon “esperanto”, t.e. espero. La verda stelo estas ĝia simbolo, ĉar verdo simbolas esperon kaj la kvinpinta stelo simbolas la kvin kontinentojn.

La verda koloro ĉeestas ankaŭ en la flago de Sabadell, same kiel la blanko de paco kaj la suna flavo. Urbo, kiu sentas sin feliĉa akcepti la 34an Katalunan Kongreson de Esperanto. Kiu sentas sin profunde fiera, ke en ĝi situas unu el la esperanto-centroj plej viglaj kaj firmaj en Katalunio; urbo, kiu esperas, ke esperanto estos lingvo de la estonto kaj la estonto kaj ke ties komunumo kresku, ĉar tio signifos, ke ekregas la racio kaj la komunikado, la rilato inter la homoj kiel precipa kialo por esti kune.

Dankon por okazigi en tiu ĉi urbo, kiu estas la via, ĉi tiun kongreson de la lingvo ĉiesa.



SIOERD BONGA

Denove Sabadell gastigas Katalunan Esperanto-Kongreson, ĉi-foje kun speciala allogaĵo: la tutjara urba omaĝo al nia esperantista pioniro Jaume Viladoms i Valls, en kies oficiala programo enestas ne nur la Kongreso, sed ankaŭ aliaj programeroj, kie la esperantistoj aktive kunlaboris. Inter ili elstaras la solena omaĝaranĝo okazinta en Teatre Principal en aprilo kaj ankaŭ la ekspozicio pri la aktiva agado en pluraj kampoj de la omaĝato: sendube lia unua amo estis esperanto, ĉar nur naŭ-jara li lernis la lingvon (tiutempa foto aperas en la ekspozicio por pravigi ĉi tiun aserton). Homo sentema kaj solidara, baldaŭ li aliĝis al labo-

ristaj kaj politikaj organizaĵoj, kie li aktivis respondece kaj tio sendis lin en la diktaturajn prizonojn.

Do ni omaĝas lin en nia kongreso, krom pro lia esperantisteco —ja li estis la instruisto de la unua postmilita kurso de esperanto en nia urbo en 1950—, ankaŭ pro lia plurfaceta aktivado kaj ĉefe pro lia majstreco en la teknika instruado metalurgia kaj kiel brila matematikisto. Pluraj tiamaj esperantistoj ankoraŭ aktivas, ĉar lia influo forte enradikiĝis en ni.

En la komenco de mia saluto mi mencias, ke nia urbo denove akceptas esperanto-kongreson, la nunan 34an: antaŭ 25 jaroj, en 1983, ni gastigis ankaŭ la 19an Katalunan Kongreson (la unuan postmilitan), ĉar la 18a Kongreso okazis en la urbo Manresa en 1936, ĵus antaŭ la arma puĉo. Krome ankaŭ en nia urbo okazis la 1a Kongreso en 1910, kun la fondo de Kataluna Esperantista Federacio. Ĝia unua prezidanto fariĝis Domènec Serdà, mem sabadellano.

Estas memevidente, ke ni fieras pri nia esperantisteco, sed multon mi silentas; ja tion vi povos legi en verkata historia raporto, kiu espereble aperos venontjare enkadre de la aranĝoj festantaj la centjariĝon de la 5a Universala Kongreso, okazinta en Barcelono en 1909.

Dankante vian partoprenon en nia kongreso, mi deziras, ke vi ĝuu ĝin en etoso de amikeca konkordo.

Llibert Puig i Gandia
Prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio
kaj de la Loka Kongresa Komitato

La kongresejo

La kongreso okazos en Casal Pere Quart. Temas pri impona domo de 1920 m² konstruita de la familio de la fama kataluna poeto Pere Quart la jaron 1862. Ĝiaj spektaklejo, aŭditorio, tri salonoj, ekspoziciejo, granda korto kaj publika teatro, kune kun ĝia tuta teĥnologia ekipo, igas la domon taŭgega loko por okazigi sukcesan kongreson.

Joan OLIVER i SALLARÈS (Pere Quart) estis kataluna verkisto naskiĝinta en Sabadell la jaron 1899. Estante el burĝa familio, li studis juron, sed baldaŭ okupiĝis pri literaturo kaj kunlaboris en pluraj ĵurnaloj. En 1934 li aperigis sub la pseŭdonimo Pere Quart sian unuan poem-libron *Senkapigoj* (Decapitaciones), kie inter humuro kaj satiro troveblas kelkaj temoj, kiuj poste definitive karakterizos lian verkaron. Ĝin sekvas *Bestiaro* (Bestiari, 1937), epigrama poemaro kaj eta lingva ĉefverko. Li aperigis ankaŭ plurajn teatraĵojn, kiel *Tragedion en Liliputo* (‘Una tragèdia a Lilliput, 1928) kaj *La malsaton* (La fam, 1938). Dum la civitana milito (1936-39), lia verkaro transiris de kritiko al aperta aktivismo. Li ekziliĝis en 1939 kaj vivis en Santiago de Chile ĝis 1948, kie eldoniĝos lia elegia poemaro *Aŭtuna salono* (Saló de tardor, 1947). Reveninte en Katalunion, li sekvas la padon de la “historia realismo”. Indas mencii liajn poemarojn *Vrakotero* (Terra de naufragis, 1956), *Pagitaj ferioj* (Vacances pagades, 1960) kaj *Kvar mil vortoj* (Quatre mil mots, 1977). Inter liaj teatraĵoj, *Ŝtelita danco* (Ball robot, 1960). Li ankaŭ abunde tradukis, i.a. Colette, Elsa Morante, Simone de Beauvoir, Molière, Shaw, Claudel, Beckett kaj Ĉeĥov. Li ricevis multnombrajn premiojn, i.a. tiun de la Prezidanto de la Franca Respubliko, kiel tradukisto, kaj la Honor-Premio de la Kataluna Beletro.

FGC (suburba trajno) Barcelono - Sabadell

Haltejo Sabadell Rambla, tuj ĉe la kongresejo, estas trajnoj ĉiun 20an minuton.

- Unua matena trajno el Barcelono (Plaça Catalunya) ĝis Sabadell Rambla: 05.45a
- Unua matena trajno el Sabadell Rambla ĝis Barcelono (Plaça Catalunya): 05.29a
- Lasta nokta trajno el Barcelono (Plaça Catalunya) ĝis Sabadell Rambla: 00.15a (sabate kaj ĉi-dimanĉe je la 02.12a)
- Lasta nokta trajno el Sabadell Rambla ĝis Barcelono (Plaça Catalunya) ĝis: 23.17a (sabate kaj ĉi-dimanĉe je la 1.27a)

Moviĝi tra Sabadell

- Taksie: la telefonnumero de Ràdio Taxi Sabadell estas (+34) 93 727 48 48
- Buse: linioj 1, 2 aŭ 3 alproksimigas onin al kongresejo de Hotelo Urpi kaj male.

Kristnaska foiro

Antaŭ la kongresejo kaj tra la ĉefa strato de Sabadell, nome Rambla, vi trovos la tradician kristnaskan foiron katalune konatan kiel “Fira de Santa Llúcia”. Tra la buĉoj de la foiro vi malkovros la kuriozajn kristnaskajn tradiciojn de Katalunio, kiel “caga tió” (ŝtipon, kiu fekas donacojn kaj dolĉaĵojn al la infanoj), kaj la figurojn por konstrui la tradician “pessebre” (kripo). Inter tiuj figuroj elstaras “caganer” (fekanto).

Podiuloj

Elisabet Abeyà (1951) estas instruistino por infanoj kun lingvaj malfacilaĵoj. Ŝi verkis multajn artikolojn en pedagogiaj revuoj kaj infanajn fabelojn, en la kataluna. Ŝi tradukis el la angla en la katalunan librojn por infanoj kaj junuloj, artikolojn de Gandhi kaj la tutan verkaron de Joan Mascaró i Fornés (liajn anglalingvajn versiojn de *Bhagavad-gitao*, *Upaniŝadoj*, *Dhammapada*, kaj liajn verkojn *Llànties de Foc* [Fajrokandeloj] kaj *La creació de la fe* [la kreado de la fido]). Ŝi aktivis en Majorka Esperantistaro.

Hèctor Alòs (1965) estas komputikisto kaj licenciulo pri lingvisto. Li estis sekretario de KEA kaj ĉefredaktoro de Kataluna Esperantisto. Nuntempe estas respondeculo pri la eldonoj de KEA kaj kundirektoro de la Kolekto Delfi Dalmau. Kiel studento pri lingvistiko, li devis fari esplorlaboron por la fako “sociolingvistiko”, kiu fariĝis enketado al la katalunaj esperantistoj en novembro 2007.

Joan Felip (1973) estas internaciista aktivulo, membro de la platformo “Aturem la guerra” [Ni haltigu militon]. Li nuntempe kunlaboras kun diversaj afganaj demokratiaj organizoj kaj unuopuloj kaj plurfoje estis en Afganio.

Lluís Batlle (1981) estas telekomunika inĝeniero kaj redaktoro de *Kataluna Esperantisto*.

Joan Català (1978) estas komputikisto, aktivulo de la Kataluna kaj Valenciana Esperanto-Junularoj kaj lanĉinto de mondakalendaro.org kaj klaku.net.

Mon Cardona fakas pri dancoj kaj tradiciaj muzikoj de la tuta mondo. Li estas instruisto pri dancado kaj ludas diatonan akordionon kaj tradician katalunan fluteton. Li muzikas en du bandoj: “Tercet Treset” kaj “Sants & Fot”.

Alejandro Cossavella (1965) estas transnacia muzikisto, li koncertas sole kaj kun la grupoj “La Porkoj” kaj “Strika Tango”. Li loĝas en Bariloche, argentina Patagonio, kie li regule koncertas hispane, angle kaj esperante. En esperanto li kantas siajn proprajn kanzonojn.

Lluís de Yzaguirre (1955) estas lingvisto, direktoro de la Laboratorio pri Lingvistikaj Teknologioj de la Universitato Pompeu Fabra (Barcelono). Li aktivis en TEJO kaj kunfondis Katalunan Esperanto-Asocion.

Pedro Hernández (1966) estas ĵura tradukisto de slavaj lingvoj. De 2008 li estas vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. Li estas ankaŭ membro de interalie Senacieca Asocio Tutmonda, SAT en Hispanio, Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio kaj Internacia Naturista Organizo Esperantista, kaj patro de denaska esperantistineto.

Dore Kasimir estas mikrobiologo, li laboris en la Aŭstra Akademio de Sciencoj kaj en la Instituto pri Media Medicino de Vieno. Li nun laboras kiel memstara biologo kovrante larĝan spektron da temoj, kiel la kvaliton de trinkaj kaj banaj akvoj, la informadon al konsumantoj kaj eŭropajn esplorprojektojn. De antaŭ multaj jaroj li respondecas pri la turismaj mediaj informoj, kiujn ricevas la germanaj turistoj vizitantaj Kataluniojn.

Arno Lagrange (1956) estas konata en Esperantujo ĉefe kiel teatra aktoro, tradukisto, enscenigisto, scienteĥnikisto kaj administranto. Li laboris interalie en la jenaj teatraj ensembloj: Teatro Esperanto de Parizo (TESPA), La Krizalido, Kallima, Théâtre de l'Épicéa kaj Teatra Trupo de Tuluzo. Samtempe, li laboras kiel komputilisto kaj estas unu el la ĉefaj kontribuantoj al la esperantlingva Vikipedio.

Xavier Margais (1946) estas doktoro pri Historiaj Sciencoj por la Universitato de la Balearaj Insuloj. Li publikigas artikolojn en fakaj revuoj kaj partoprenas en kongresoj kaj konferencoj ĉefe dediĉitaj al la sociala historio. Li estas aŭtoro de *El moviment esperantista a Mallorca (1898-1938)* [La esperanto-movado en Majoroko (1898-1938)] (Palma, 2002) kaj *Bunyola. Amb la por al cos* [Bunyola. Plene de timo] (Palma, 2004).

Nicole Margot estas redaktoro de la revuo *Etnismo* kaj membro de la estraro de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL).

Floréal Martorell (1956), filo de katalunaj ekzilitoj en Tuluzo, estas muzik-aktivulo. Li fondis EUROKKA (Esperanto-Universalan Rok-Organizon, Kolektivon Komunik-Asocion) en 1988, kaj en 1990 kreis la esperanto-muzikan eldonejon Vinilkosmo kaj la gazeton *Rok-gazet'*. Li partoprenas en la organizado de multaj esperanto-muzikaj prezentaĵoj, ĉekape KAFE, sed ankaŭ de multaj turneoj, kiel la ĉi-jara de Alejandro Cossavella, en kies kadro li partoprenas nian kongreson.

Abel Montagut (1953) estas mezlerneja instruisto pri la katalunaj lingvo kaj literaturo. Li verkas en esperanto kaj en la kataluna. Lia plej fama verko en esperanto estas la eposo *Poemo de Utnoa* (1993). En la lastaj jaroj li laboras ĉefe pri junularaj romanoj kaj aparte interesiĝis pri la figuro de Jules Verne, al kiu estas ligita lia lasta romano en la kataluna *El manuscrit de Jules Verne* (2003). Samtempe, li estas ankaŭ kundirektoro de la Kolekto Delfí Dalmau, de KEA, kiu publikigas tekstojn en rilato al la lingvaj rajtoj kaj la lingva diverseco.

Òscar Puig (1959) estas komputila fakestro en plurnacia entrepreno. Post jaroj da aktivado en la loka kaj junulara esperanto-movado, li fariĝis la unua prezidanto de Kataluna Esperanto-Junularo kaj prezidanto de Centro de Esperanto Sabadell. Li estas kunfondinto de Kataluna Esperanto-Asocio, en kiu li havis diversajn gvidajn postenojn. Li kunfondis ankaŭ la katalunan sektion de la Internacia Humanitara Organizo Espero kaj aktivadas en ĝi.

Francesc Poblet (1960). Licenciulo pri Historio kaj pri Socia kaj Kultura Antropologio. Li estas membro de la Konsilio de la Departemento pri Nuntempa Historio de la Universitato de Barcelono kaj ĉefredaktoro de la revuo *Lletres*. Li partoprenis en la redaktoraĵoj de la verkoj *La Guerra Civil a Catalunya* [La Enlanda Milito en Katalunio] kaj *El Franquisme a Catalunya* [La Frankismo en Katalunio] kaj estis direktoro de la kolekto pri nuntempa historio “Quaderns de Barcelona. Memòria Històrica” [Kajeroj de Barcelono. Historia Memoro]. Li aperigis artikolojn pri la historio de la kataluna esperantismo en pluraj revuoj, i.a. *Esquerra Nacional, Catalunya, Sàpiens* kaj *Kataluna Esperantisto*, krom ankaŭ en la ĵurnalo *Avui*. Li aŭtoris plurajn librojn pri la

nuntempa historio de Katalunio, kaj en la jaro 2004 publikigis la volumon *La komenca esperanto-movado en Katalunio*.

A Giridhar Rao (1963) doktoriĝis pri la angla lingvo en la Universitato de Hajderabado (Barato), kie li gaste prelegas. Lia disertacio pri la sciencfikcio (1994) kondukis lin al la hom-emancipigaj eblecoj de esperanto, tiu ido de la europa Klerismo. Liaj interesoj inkluzivas ĵurnalismojn pri lingvopolitikaj temoj; redaktadon kaj dokumentadon ĉefe por neregistaraj organizaĵoj; kaj la komunik-eblecojn de la interreta epoko. Li nuntempe esperantigas la autobiografion de Mahatmo Gandhi. Li estas ĝenerala sekretario de Federacio Esperanto de Barato.

Sebastià Ribes (1945) estas lerninto kaj kunlaborinto de Jaume Viladoms, kaj iama instruisto, kunfondinto kaj direktoro de la Kooperativo Jaume Viladoms. Li estis membro de la magistrato de Sabadell (1979-1995) kaj kunaŭtoro de la broŝuro *El que cal saber del problema lingüístic* [Ĉio sciinda pri la lingva problemoj].

Humphrey Tonkin (1939) estas brit-usona profesoro pri angla literaturo, specialisto pri la elizabeta periodo. Li diplomigis en Kembriĝo, doktoriĝis en Harvard kaj estis prezidanto de la Universitato de Hartford (Nov-Jorkio, Usono). Li kunfondis la junularan esperanto-asociacion en Britio. De 1961 ĝis 1971 li membris en la estraro de TEJO, kaj de 1969 ĝis 1971 li estis ties prezidanto. En 1963 li fondis la revuon *Kontakto*, de kiu li fariĝis la unua redaktoro. Li fariĝis prezidanto de UEA en 1974, post Ivo Lapenna, kaj daŭrigis sur la posteno ĝis 1980. Li denove prezidis ĝin de 1986 ĝis 1989, kaj en 2001-2004 oficis kiel vicprezidanto. Li estas ankaŭ la prezidanto de la Esperantic Studies Foundation kaj kunredaktoro de la revuo *Language Problems & Language Planning* [Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado]. Li estas aŭtoro de la eseo *Lingvo kaj popolo* (2006), kie li diskutas la rolon de esperanto en nia socio, kaj tradukis i.a. du ŝekspirajn teatraĵojn: *La vivo de Henriko Kvina* (2003) kaj *La vintra fabelo* (2006).

Teatra Trupo de Tuluzo estas amatora teatra trupo, kiu plenumas siajn projektojn kun “amo”. Temas pri jam jarcenta tradicio en esperanto trejniĝi pretigante teatraĵojn (unuaj provoj okazis jam en 1896!). La reago de la publiko tre certe estas kuraĝiga por tiuj novaj projektoj. En 2004 kaj 2005 Teatra Trupo de Tuluzo prezentis sian kvaran teatraĵon, Familia Etoso, en la Kataluna Kongreso en Ceret, dum Zamenhof-festo en Tuluzo, dum IS en Wetzlar en la Jubilea Kongreso Bulonjo 2005 en KEF en Helsinki kaj en la Universala Kongreso en Vilno en julio 2005, kaj laste en Festo.

Martin Wiese estas la ĉefkantisto kaj gitaristo de la rokbandoj Persone. Antaŭe li estis membro de la grupo Amplifiki. Intertempe li koncertas ankaŭ sole kaj eldonis soloalbumon.

Kongresa temo: “Esperanto kaj tutmondiĝo: perspektivoj por la estonto”

La ĉi-jara kongresa temo “Esperanto kaj tutmondiĝo: perspektivoj por la estonto” fontas el la nuntempaj diskutoj en la kataluna por pli precize difini la celojn de esperanto en la hodiaŭa haste ŝanĝiĝanta mondo, kaj kiuj kondukis al la akcepto de la dokumento pri valoroj, celoj, kaj principoj de KEA en la pasinta asembleo de la asocio en marto.

Tiucele ni kalkulas kun la partopreno de kvin elstaraj prelegantoj el tri kontinentoj, kiuj prezentos siajn starpunktojn laŭ malsamaj perspektivoj: Humphrey Tonkin (“Tutmondiĝo, diverseco, esperanto”, sabaton je la 16a h.), Giridhar Rao (“Esperanto: ilo por la malkoloniigo”, sabaton je la 17a h.), Óscar Puig (“Kial mi daŭre estas esperantisto?”, dimanĉon je la 11a h.), Abel Montagut (“Globiŝo kaj la relativeco de la lingvoj”, dimanĉon je la 17a h.) kaj Nicole Margot (“Etnismo kaj esperanto”, dimanĉon je la 18a h.).

Rimarkindas, ke la kongresa temo kompletiĝas per kvazaŭ paralela serio de tri prelegoj pri diversaj mondopartoj: “Kiel kompreni Kaŭkazion?” (Pedro Hernández, sabaton je la 18a h.), “Ĉu homaj rajtoj en Afganio?” (Joan Felip, dimanĉon je la 19a h.) kaj “Lingvaj rajtoj en Barato: la breĉo inter politiko kaj praktiko” (Giridhar Rao, lundon je la 10a h.). Ilin kompletigas lingvo-ateliero pri la kroata, laŭ la ideo de la ateliero pri la rumana en la pasinta Iberia Renkontiĝo en Benicàssim (Đore Kasimir, dimanĉon je la 12a h.), kaj malpli streĉa dancado de diverslandaj popoldancoj (Mon Cardona, sabaton kaj dimanĉon je la 18a h. kaj duono).

Celoj, valoroj kaj principoj de Kataluna Esperanto-Asocio

Kataluna Esperanto-Asocio deziras esprimi siajn celojn, valorojn kaj principojn. Nia agado estas bazita sur la aplikado de la rajtoj agnoskitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, en la Universala Deklaracio de la Kultura Diverseco, en la Universala Deklaracio de la Lingvaj Rajtoj kaj en la Manifesto de Prago. Por atingi niajn celojn, kiel vivanta parto de la popolo, ni laboras kune kun la landa socia reto, kaj ni same kunlaboras kun la institucioj, ne perdante nian sendependecon nek nian identecon.

Celoj de la Asocio

- a) Disvastigi en la katalunlingva teritorio esperanton, kiel neŭtralan internacian helplingvon, kiel la plej bonan eblon por lingva demokratio, garantiantan la valorojn de la lingvaj rajtoj, de la lingva diverseco kaj de la rajto al plena komunikado inter homoj kun malsamaj lingvoj.
- b) Instigi en la katalunlingva teritorio la uzadon de la propra lingvo kaj diskonigi la katalunan kulturon en la mondo kaj aliajn kulturojn pere de esperanto.

Valoroj de la Asocio

- a) La lingvaj rajtoj, komprenataj kiel nedisigebla komplemento de la homaj rajtoj.
- b) La lingva diverseco, komprenata kiel esenca parto de la kultura diverseco.
- c) La rajto al plena komunikado inter homoj kun diversaj lingvoj, kiel rimedo por venki la antaŭjuĝojn, survoje al packulturo.

Principoj de la Asocio

En nia aktivado por la lingvaj rajtoj ni konsideras, ke:

- La **lingvaj rajtoj**, disvolvataj surbaze de la **homaj rajtoj**, estas esenca elemento de libereco kaj de paco.
- La **egaleco de lingvaj rajtoj** de la individuoj kaj de la komunumoj estas esencaj por tiu celo. Nenio devas miskomprenigi, ke ekzistas lingvoj pli taŭgaj por difinitaj celoj, kvankam la plej privilegiitaj tavoloj de la hegemoniaj komunumoj kaj de tiuj asimilitaj ofte instigas tion pensi al multaj homoj per sia ekonomia, politika kaj milita potenco aŭ pro sia prestiĝo.
- La **diverseco** estas garantio de kultura riĉo. La sennombraj formoj fari kaj diri estas parto de la **komuna homa heredaĵo**, trezore akumulita dum jarmiloj. Ni volas kontribui al la vivtenado de la kultura diverseco kaj, aparte, de tiu lingva.
- La **komunikado** inter la diversaj komunumoj estas necesa por interkonatiĝo, helpanta al la libereco de ĉiu el ili, kio estas fundamento de **paco**. La flueco de komunikado inter la komunumoj kreskigas senton de **solidareco** kaj samtempe ebligas,

ke la diversaj kulturoj komplemente riĉigu unu la alian. Ni volas kontribui al tio, ke la informfluo fariĝu vere **multflankaj**.

- Ni konsideras nesufiĉa la celon korekti la preskaŭ-**monopolon de unu nacia lingvo** en la monda interkomunikado per **oligopolo de kelkaj lingvoj**.
- Ni konsideras la konceptan kaj valoran dividon interlingvoj internaciaj, naciaj kaj regionaj, manifestiĝo de **lingva imperiismo**. Neŭtrala lingvo, kiel esperanto, povas agi kiel **ponto**, favorante kaj substrekante la plenan egalecon de la lingvoj.
- La uzado de neŭtrala internacia helplingvo, aŭ interlingvo, ne devas negative influi la ĉiutagan vivon de la lingvaj komunumoj kaj oni devas ĝin rezervi, pere de taŭga konsciigo kaj trafaj lingvopolitikoj, por specifaj funkcioj, por ne damaĝi la **ekologian ekvilibron** inter ili. Ĉion, kion povas plenumi la lokaj lingvoj, ne devas plenumi la tutmonda interlingvo.
- Por kontribui al tiu ekvilibro, ni konsideras necesa **pozitivan diskriminacion** por atingi la normaligon de la minorigitaj lingvoj en ties medio aŭ teritorio kaj tiel defendi la lingvan diversecon. Krome, ni pledas por la rajto de la enmigrintoj lerni sian denaskan lingvon, inkluzivante ĝin en la rajton je movo de la homoj.
- La uzado de neŭtrala interlingvo, apud tiu propra, ne ekskludas, sed favorigas la uzadon de aliaj lingvoj danke al la tempo-paro per la lernado de punta lingvo kaj al la disvastigo de la konscio pri egaleco, valoro kaj respekto por la lingva diverseco: ni opinias, ke dezirindas **instigi la lernadon de fremdaj lingvoj**, ĉefe de tiuj geografie kaj kulture proksimaj. La **pasiva plurlingveco** estas taŭga eblo por helpi la komprenon de pliaj lingvoj sen damaĝi tiun propran.
- La uzado de interlingvo neŭtrala kaj facila estas grava, sed malsufiĉa per si mem. Kvankam ĝi estas praktika pruvo de la egaleco inter la lingvoj, kaj ni konstatas, ke tiu justocela perspektivo enradikiĝas en konsiderinda parto de la esperantolingvanoj, ni konsideras, ke **gravas la plua edukado al la valoroj de la diverseco kaj de la egaleco de rajtoj, specife de tiuj lingvaj**.

Sabaton, la 6an de decembro

Horo	Salono Jaume Viladoms	Salono Criach-Galbany
10:00	Akceptado de la kongresanoj	
11:00		
12:00		
13:00	Solena malfermo de la kongreso <i>Loko: Urbodomo de Sabadell (Pl. Sant Roc 1)</i>	

Tagmanĝa paŭzo

16:00	Humphrey Tonkin: Tutmondiĝo, diverseco, esperanto	kongresa temo
17:00	A Giridhar Rao: Esperanto, ilo por malkoloniigo	kongresa temo
18:00	Pedro Hernández: Kiel kompreni Kaŭkazon?	Arno Lagrange: Laborgrupo pri Vikipedio
19:00	Xavier Margais, Francesc Poblet: <i>Presentació del llibre</i> “El Congrès Universal d’Esperanto de 1909 a Barcelona”	Floréal Martorell: Ĉu esperanto-muziko supervivos la disko-krizon?

Vespermanĝa paŭzo

22:00	
23:00	
00:00	

Dimanĉon, la 7an de decembro

Hora	Salono Jaume Viladoms	Salono Criach-Galbany
10:00 <i>en català en la kataluna</i>	Sebastià Ribes: <i>Jaume Viladoms: el mestre i l'esperantista</i>	Lluís Batlle: Lingva influo al perceptado
11:00	Hèctor Alòs: Kiaj estas la katalunaj esperantistoj?	Joan Català: Kial klaku.net?
12:00	Òscar Puig: Kial mi daŭre estas esperantisto? <i>kongresa temo</i>	Alejandro Cossavella: Esperanto en Argentino
13:00		

Tagmanĝa paŭzo

16:00	Elisabet Abeyà: Joan Mascaró: inter oriento kaj okcidento	Lluís Batlle: Enkonduko al nunaj komputiloj
17:00	Abel Montagut: Globiŝo kaj la relativeco de la lingvoj <i>kongresa temo</i>	Asembleo de Kataluna Esperanto-Junularo
18:00	Nicole Margot: Etnismo kaj esperanto <i>kongresa temo</i>	
19:00	Lluís de Yzaguirre: La aŭtomataj tradukiloj el la kataluna kaj hispana al esperanto	Joan Felip: Ĉu homaj rajtoj en Afganio?

Vespermanĝa paŭzo

22:00	
23:00	
00:00	

Salono Eulàlia Giner	Korto / Pati	Amasloĝejo en CJS
Kunveno de subskribintoj de la Kampanjo por Homa Digno		
Dore Kasimir: Ateliera prezento de la kroata lingvo		

	<p>Mon Cardona Ateliero pri tutmondaj popoldancoj <i>Taller de danses tradicionals d'arreu</i></p>	<p>bilíngüe dulíngve</p>
--	---	------------------------------

<p><i>Resumo: Angelino, 21-jara studentino pri biologio, fraŭlino kaj virgulino, kaj Samanto, ekscitiĝema kaj pesimisma 50-jara dommastrino kun du geinfanoj samaĝaj ol Angelino interkonatiĝas en kafejo pro forta ekstera pluvo. Ili interŝanĝas diversajn vidpunktojn pri la vivo.</i></p>	<p>Teatra Trupo de Tuluzo: Duonhora pluvego (de Rikardo Cash)</p>
	<p>Martin Wiese: Koncerto</p>

London, la 8an de decembro

Hora	Salono Jaume Viladoms	Salono Eulàlia Giner
10:00	A Giridhar Rao: Lingvaj homaj rajtoj en Barato: la breĉo inter politiko kaj praktiko	
11:00	Abel Montagut: Jules Verne kaj esperanto	Ferriol Macip: Neformala kunveno de membroj de KEA
12:00	Humphrey Tonkin: Poetoj pri esperanto	Joan Català: Kunveno de Liberecana Kontaktejo
13:00	Fermo de la kongreso	
14:00		

Banquet

Primer plat:

Risoto de bolets
o Timbal d'alberginia, tomàquet i formatge de cabra gratinat amb olivada.

Segon plat:

Llonza llaminera amb fruits vermells o Rap a la marinera.
(Hi haurà un plat a part per als vegetarians, encara no fixat)

Postres

Cafè

Pa, aigua i vi

Tra la urbo	Restoracio "Clau de fa"
<p style="text-align: center;">Vizito al la urbo <i>Loko: el antaŭ la urbodomo de Sabadell (Pl. Sant Roc 1)</i></p>	
	Bankedo

Bankedo

Unua plado:

Funga rizaĵo
 aŭ Muldaĵo de melongeno, tomato kaj kaprina fromaĝo gratenita kun oliva kaĉo

Dua plado:

Fajna kotleto kun ruĝaj fruktoj aŭ Lofiaĵo je la marista maniero
 (Estos aparta plado por la vegetaranoj, ankoraŭ ne fiksita)

Deserto

Kafo

Pano, akvo kaj vino

Listo de aliĝintoj (ĝis la 1a de decembro)

Abdelkader Khamchane	Bejaia (Alĝerio)
Abel Montagut Masip	Cervià de les Garrigues (Les Garrigues)
Adrià Sánchez	Moià (Bages)
Agnieszka Mozer	Varsovio (Pollando)
Aida Sunyol Sanchez	Cardedeu (Vallès Oriental)
Alejandro Cossavella	Bariloche (Argentino)
Alekĉjo Raymond	La Mulatiere (Arpitanio, Francio)
Alex Humet	Berchem (Flandrio, Belgio)
A. M ^a Molera Urgellés	Moià (Bages)
Andrea Ivnik Skaljic	Tarragona (Tarragonès)
Andrés Ginés López	Santa Maria del Camí (Majorco)
Àngels del Pozo	Barcelona (Barcelonès)
Àngels Ollé i Baños	Sabadell (Vallès Occidental)
Anna Illa Molera	Moià (Bages)
Anna Raventós i Gascon	Els Hostalets de Pierola (Anoia)
Anneleen Nys	Mol (Belgio)
Antoni Badia	Lleida (Segrià)
Antonio Collado Ortiz	Bétera (Camp de Túria)
Arnau Massanas Daunis	Girona (Gironès)
Arno Lagrange	Fabrezan (Francio)
Aurora Roger	Barcelono (Barcelonès)
Biel Murcia Rius	Sabadell (Vallès Occidental)
Brian Russell	Barcelono (Barcelonès)
Bruno Graf	Ittigen/Bern (Svislando)
Carles Vela i Aulesa	Barcelona (Barcelonès)
Carles Verdugo Rojano	Mataró (Maresme)
Carlos Hernández Moreno	Terrassa (Vallès Occidental)
Carme Cànovas	Sabadell (Vallès Occidental)
Carme Garcia Martínez	Manresa (Bages)
Christiane Sixtus Pot	Perly/Genève (Svislando)
Christine Vidotto	Tuluzo (Okcitanio)
Christophe Chazarein	Toulouse (Romio)
Cristina Balaguer Prunés	Manresa (Bages)
Dani Rubió Amorós	Sabadell (Vallès Occidental)
Daniel Murcia Rius	Sabadell (Vallès Occidental)
Darío Rodríguez López de Silva	Madrido (Hispanio)
Denizo Priskorn	Kopenhago (Danio)
Dolors Ortiz Cejudo	El Vendrell (Baix Penedès)
Đore Kasimir	Vilanova i la Geltrú (Garraf)
Edith Schönwälder Walter	Manresa (Bages)
Elisabet Giráldez	Sabadell (Vallès Occidental)
Elisabeth Abeyà	Bunyola (Mallorca)
Elisabeth Laika	München (Bavario)
Elisabeth Lambert	L'Hay les Roses (Francio)
Éric Collignon	Sabadell (Vallès Occidental)
Eva Rodon Armadans	Mataró (Maresme)
Felip Artero Lozano	Barcelona (Barcelonès)
Ferriol Macip i Bonet	Barcelona (Barcelonès)
Flo Martorell	Donavila/Donneville (Francio)
Francesc Ibàñez	Mollet del Vallès (Vallès Oriental)
Francesc J. Inglada	Tarragona (Tarragonès)
Francesc Poblet i Feijoo	Barcelona (Barcelonès)
Francesc Serra Baltiérrez	Manresa (Bages)

Francesc Verdugo Rojano	Mataró (Maresme)
Frederic Giràldez	Sabadell (Vallès Occidental)
Fulmo de Kopenhago	Kopenhagen (Danio)
Gemma Armadans Gil	Mataró (Maresme)
Gerard Castells	Ripollet (Vallès Occidental)
Gerard Escuer i Parramona	Barcelona (Barcelonès)
Gerard Sugranyes	Cerdanyola (Vallès Occidental)
A Giridhar Rao	Hyderabad (Barato)
Glòria Torras	Sabadell (Vallès Occidental)
Guillem Sevilla Trujillo	Barcelona (Barcelonès)
Hèctor Alòs i Font	Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental)
Humphrey Tonkin	University of Hamford (Usono)
Jaume Castells	Ripollet (Vallès Occidental)
Jean Garcia	Tuluzo (Okcitanio)
Joan Català	Benicàssim (La Plana Alta)
Joan Inglada Roig	Àger (La Noguera)
Joana Sales Cucó	Lleida (Segrià)
Joel Rodon Armadans	Mataró (Maresme)
Jofre Sivillà Balaguer	Manresa (Bages)
Jordi Aromí Martos	Mataró (Maresme)
Jordi Carbonell	Barcelono (Barcelonès)
Jordi Llop	Sabadell (Vallès Occidental)
Jordi Marquès i Canals	Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental)
Jordi Pedrós Cortasa	Balaguer (La Noguera)
Jorge Pavón	El Escorial (Hispanio)
Jose A. Rodríguez Benito	Madrid (Hispanio)
Jose Bashombana	Luanda (Angolo)
Josep Enric Peres i Blesa	València (L'Horta)
Josep Franquesa Godia	Lleida (Segrià)
Josep Franquesa Solé	Lleida (Segrià)
Josep M. Serrano Subietas	Tarragona (Tarragonès)
Josep Maria Milla i Saldon	Mataró (Maresme)
Josep Tugas i Pitarch	Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental)
Juan Trenado Serrano	Fuenlabrada (Hispanio)
Júlia Collignon	Sabadell (Vallès Occidental)
Kinou Dardennes	Foix (Francio)
Llibert Puig	Sabadell (Vallès Occidental)
Lluís Aragay i Albadalejo	Barcelona (Barcelonès)
Lluís Batlle i Rossell	Santa Pau (La Garrotxa)
Lluís de Yzaguirre	El Masnou (Maresme)
Luis E. Hernández García	Valladolid (Kastilio-Leono, Hispanio)
Luisa García	Figueres (Alt Empordà)
Manel Vinyals	La Sénia (Montsià)
Marc Collignon	Sabadell (Vallès Occidental)
Marco Menichetti	Fucecchio (Itàlio)
Margarida Ustrell	Ripollet (Vallès Occidental)
Maria Manuela Boieiro	Alcochete (Portugal)
M ^a Rafaela Uruña	Valladolid (Hispanio)
Marina Ollé	Sabadell (Vallès Occidental)
Marion Quenut	Tuluzo (Okcitanio)
Marisa Rodríguez Fernández	Vilanova i la Geltrú (El Garraf)
Marta Moline Golovart	Barcelona (Barcelonès)
Martí Llop	Sabadell (Vallès Occidental)
Martin Wiese	Stockholmo (Svedio)
Mateu Humet	Berchem (Belgio)
Mateu Vic i Coll	Santa Maria del Camí (Mallorca)

Miguel Boieiro	Alcochete (Portugal)
Mireia Giràldez	Sabadell (Vallès Occidental)
Mirjam Larissa Walter	Madrido (Hispanio)
Mon Cardona Farrés	Barcelona (Barcelonès)
Montse Illa Molera	Moià (Bages)
Montserrat Franquesa	Barcelona (Barcelonès)
Montserrat Parera	Sabadell (Vallès Occidental)
Mundeta Gòdia Forcada	Lleida (Segrià)
Nicole Buisson	Llupià (Rosselló)
Nicole Margot	Lausane (Vaudo, Svislando)
Nsima Mbele Ritha	Luanda (Angolo)
Nuri Puerta Cusi	Figueres (Alt Empordà)
Núria Coll	Sabadell (Vallès Occidental)
Olga Txernixova	Santa Pau (Barcelonès)
Olivier Buisson	Delle (Franc-konteo)
Òscar Codina Garriga	Moià (Bages)
Òscar Puig i Cànovas	Sabadell (Vallès Occidental)
Pau Climent i Pérez	Callosa d'en Sarrià (La Marina Baixa)
Pau Poblet Torrejón	Barcelona (Barcelonès)
Pedro Hernández	Madrido (Hispanio)
Pedro M. Martín Burutxaga	Blanes (La Selva)
Pere Palà i Guerra	Manresa (Bages)
Pere Palà Schönwälder	Manresa (Bages)
Pilar Cardona Méndez	Àger (La Noguera)
Rafa Blanco	Altsasua (Eüskio)
Ramon Llop	Sabadell (Vallès Occidental)
Ramon Perera Perera	Barcelona (Barcelonès)
Ramon Rius	Barcelona (Barcelonès)
Ramon Rius Santamaria	Barcelona (Barcelonès)
Raül Martínez Anguita	Ciudad Real (La Mancha, Hispanio)
Raül Salinas Monteagudo	Valencia (L'Horta)
Rodica Pliscu	La Sénia (Montsià)
Roger Sanjaume i Calvet	Cardedeu (Vallès Oriental)
Rosa Espunya	Sabadell (Vallès Occidental)
Rosa Lopez Martin	Terrassa (Vallès Occidental)
Rosa Maria Rius Ros	Sabadell (Vallès Occidental)
Rosaura Alvarez	Sabadell (Vallès Occidental)
Ruslan Kokorin	Dublín (Irlando)
Samia Harir	Tuluzo (Okcitanio)
Sebastià Ribes	Sabadell (Vallès Occidental)
Sílvia Simó	Sabadell (Vallès Occidental)
Simono Damkjaer Hazard	Kopenhago (Danio)
Sol Roca Caroggio	Tarragona (Tarragonès)
Sylvie Roques	Saint Jean (Okcitanio)
Vicky Saludes i Cuberas	Barcelona (Barcelonès)
Víctor Solé i Udina	Barcelona (Barcelonès)
Virginie Suard	Parizo (Francio)
Xabier Rico Iturriotz	Gasteiz (Eüskio)
Xavier Abadia Moreno	Mataró (Maresme)
Xavier Batlle i Espinosa	Les Peces (Baix Penedès)
Xavier Margais Basi	Bunyola (Mallorca)
J. Xavier Martinez Herrera	Manresa (Bages)
Xavier Murcia Navarro	Sabadell (Vallès Occidental)
Xavier Rodon Morera	Mataró (Maresme)

Katalunaj Kongresoj de Esperanto

- 1a 1910 Sabadell (Vallès Occidental)
- 2a 1911 Tarragona (Tarragonès)
- 3a 1912 Terrassa (Vallès Occidental)
- 4a 1913 Olot (Garrotxa)
- 5a 1914 Sant Feliu de Guíxols (Baix Empordà)
- 6a 1915 Vilanova i la Geltrú (Garraf)
- 7a 1916 Reus (Baix Camp)
- 8a 1919 Manlleu (Osona)
- 9a 1921 Girona (Gironès)
- 10a 1923 Manresa (Bages)
- 11a 1924 Vic (Osona)
- 12a 1925 Ciutat de Mallorca (Mallorca)
- 13a 1926 Santa Coloma de Farners (Selva)
- 14a 1927 Sóller (Mallorca)
- 15a 1928 Vinaròs (Baix Maestrat)
- 16a 1933 El Vendrell (Baix Penedès)
- 17a 1935 Ripoll (Ripollès)
- 18a 1936 Manresa (Bages)
- 19a 1983 Sabadell (Vallès Occidental)
- 20a 1984 Olot (Garrotxa)
- 21a 1985 St. Cugat del Vallès (Vallès Occidental)
- 22a 1986 Lleida (Segrià)
- 23a 1987 Barcelona (Barcelonès)
- 24a 1989 Perpinyà (Rosselló)
- 25a 1991 Tarragona (Tarragonès)
- 26a 1993 Alcúdia (Mallorca)
- 27a 1995 Mataró (Maresme)
- 28a 1997 Figueres (Alt Empordà)
- 29a 1999 Manresa (Bages)
- 30a 2001 Girona (Gironès)
- 31a 2002 Sóller (Mallorca)
- 32a 2004 Ceret (Vallespir)
- 33a 2006 Amposta (Montsià)
- 34a 2008 Sabadell (Vallès Occidental)





Generalitat de Catalunya
Departament de Cultura
i Mitjans de Comunicació
**Centre de Promoció
de la Cultura Popular
i Tradicional Catalana**



**Ajuntament
de Sabadell**

ESPERANTO*
CAT

* Associació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio